widely read of any of the Esperanto journals, having the advantage and the disadvantage to Americans of offering in its columns English and not some foreign tongue in addition to Esperanto. But it is newsy and readily impresses one that fine propaganda work is being done in the British Isles, besides a good deal elsewhere. It has much to say, which at present it finds necessary to cram into eight pages. It is giving attention to Esperanto in the schools, and in the November issue, quoting from the *Bradford Daily Telegraph*, tells us that in the Eastwood Girls' School there are now 110 Esperanto students! Read the vigorous Esperanto of S-ro A. Barton Kent, on the occasion of his visit to the *Londona Klubo*, October 5th (p. 91). He said that his house published an eight-languaged catalogue, one of the eight languages being Esperanto. He himself had learnt French, German, Italian and Spanish, and had a smattering of Russian. Now he can easily read and write Esperanto, understand it when spoken and speak it somewhat, and can well testify to its wonderful simplicity. Of its many qualities he considers the most important that of opening the way to the learning of other languages. The *British Esperantist* has the good habit of citing the names of papers that have articles concerning Esperanto during the previous month. Thus, in the November issue are upwards of fifty such names, and in the December upwards of twenty. In the latter is an article entitled "Vain Hopes?"—a reply to a letter from one who so calls our practical Ideal, not having heard a word about Esperanto whilst travelling through Russia." It compares Esperanto to Christianity, observing that if the latter is still after "1900 years in the field, why should we expect wonders of so slow-growing a thing as a language, and in this case of one which is barely 30 years old?" Further on is quoted the familiar fact of Christianity, "The common people heard it (him) gladly;" and "so," says the writer, "I believe it will be with Esperanto—it will be adopted first by the working classes, and from them it will spread to all other classes . . . It is a sin against posterity not to do all in our power to forward any move-

ment which will make life sweeter and better than it is for us to-day." An item headed "Esperanto kaj Kommerco" tells us that world-famed firm Suchard & Co. has been induced by our samideano, Rene de Saussure, to put on the market a special first-grade chocolate labeled "Esperanto." It is printed in large letters on yellow paper with green ribbons. The best way to do propaganda work in this connection "is to ask of sellers that they procure from the firm of Suchard this brand of chocolate and then put it in their show windows. Suchard & Co. have also agreed to print Esperanto texts to be put into each package of chocolate, and thus thousands and thousands of Esperanto Ads will be sent out broadcast every day. May Esperantists write to that firm (at Neuchatel, Switzerland) to congratulate them and ask of them what is the best means of carrying on propaganda for this chocolate." It is interesting to note that in Partick there is now a regular monthly divine service in Esperanto, the one in Canonbury (London) being a feature of several years' standing. Quoted from the Evening Times, Glasgow, S. Tsuchiya says: "Should anybody intend to learn the Japanese language. I would advise him to learn Esperanto first; the grammatical construction of the latter will serve as a stepping stone between the former and the English. Moreover, Esperanto itself is gradually developing its use in Japan." Under the caption "Konsiloj por Grupkondukado," attention is called to the inquiry of G. W. Lee:

"Konsiloj por Grupkondukado

"Lastatempe, S-ro G. W. Lee, prezidanto de la Bostona Esperanta Societo, sendis poŝtkartojn al diversaj sekretarioj de Britaj Esperantaj Societoj, petante konsilojn pri varbo, amuzo, spertuligo, k.t.p., kiujn eble ili povos kaj volos doni al li, por ke liaj grupanoj povu profiti la spertojn de aliaj samideanoj; speciale, ĉar li esperas, ke lia grupo havos la privilegion gastigi la mondkongreson en 1920. Jam li ricevis kelkajn bonajn respondojn, el kiuj, kune kun aliaj venontaj, li redaktos raporton por publikigado en Esperanta ĵurnalo por kia helpo ĝi povos doni al iu persono aŭ grupo. Li

tre ŝatos ricevi multajn aldonajn konsilojn antaŭ la fino de tiu ĉi jaro, por ke la raporto estu verkita frue en 1918. Adreso: G. W. Lee, 147 Milk Street, Boston, Mass., U.S.A."

Esperanto (Geneva). Every Esperanto group that pretends to have substantial existence, or at least one member thereof, should receive and read this official organ of the Universal Esperanto Association (U.E.A.) It is altogether in Esperanto; it keeps one in touch with the movement throughout the world (e.g., the "Kroniko," in the Dec., 1917, issue, has news from Austria-Hungary, Belgium, Finland, Germany, Netherlands, Spain, Norway, Portugal, Sweden and Switzerland. While ostensibly for practical ends, like travel and commerce, it dips, however, into nearly every interest that one may associate with the language, particularly since the War has interfered with the functioning of committees, congresses and officialdom in general. Therefore we expect such articles (correspondence in this instance) as are found in the November issue under the heading, "Lingvaj Demandoj," in which the editor of Esperanto takes issue with S-ro de Saussure regarding the latter's new proposition for a phonetic alphabet. S-ro de S. seems to be the Miltiades of the Esperanto cause, doing great things, which the samideanoj applaud, and then indulgent things that bring a storm of objection. He it was that worked out the well accepted principles of "Sufiĉo kaj Neceso," and also recently prevailed upon Suchard & Co. to wrap their chocolates of the first grade with paper branded Esperanto. He has, however, met with decided opposition and been accused of being a hasty reformer by more than the editor of "Esperanto," and we are likely to read more of this from various sources. In the "Lingvaj Demandoj" pages of the double Sept-Oct. issue is a review of a 40-page brochure of H. Sents (doctor of science at Grenoble), entitled "Kion bezonas Esperanto?" (What does Esperanto need?). The author would introduce the letter **x**, dispense with **da**, introduce **dop** and **avan** to supplant **post** and **antaŭ** in their space significances, leaving these words their use in reference to time; he would

straighten out the system of derivation and, e.g., let kooper-o,-a,-anto do for kooper-acio,-ativa,-atoro, and so on. Suffice that while the reviewer admits the desirability of some of the changes and emphaticall- says that the author is not to be charged with idistic aspirations, yet on the whole he is not in sympathy, and would caution such enthusiasts and their followers to wait for the decisions of the Akademio and the Lingva Komitato, which exist for the purpose of considering just such matters. Read this 2-page article if you are a student of the refinements of Esperanto. You will be reading the thoughts of thinking men. A page and more of notes in the Nov. issue on South America, translated from the report of William A. Reid in the Bulletin of the Pan-American Union, is of timely interest and characteristic of the chief purpose for which the journal "Esperanto" is published; and the obituary of Emile Boirac is of decided interest to all who pretend to keep posted on the Eminentuloj of the language. Hardly any one, apart from Dr. Zamenhof has done more for the movement than this professor of philosophy, who was president both of the Akademio and of the Lingva Komitato. Other articles in these two issues have to do with war and with peace and with propaganda in war time and with a good deal else.

G. W. Lee.

LA MALGRANDA PADOVA-PATRIOTO

El "Cuore" de E. De Amicis

Franca ŝipo forlasis la havenon de Barcelona, por Genova, kaj sur la ŝipo estis francoj, italoj, hispanoj, svisoj. Inter aliaj sin trovis knabo dekunujara, malbone vestita, sola, kiu restis ĉiam aparte, kvazaŭ sovaĝa besto, rigardante ĉiujn per severa okulo. Kaj li havis kaŭzon por rigardi ĉiujn per severa okulo. Antaŭ du jaroj liaj gepatroj, kamparanoj de ĉirkaŭ Pa-

dova, vendis lin al ĉefo de jonglistaro. Tiu homo, instruinte lin jongli per pugnofrapoj, piedbatoj kaj fastoj, kondukis lin vojaĝe tra Francujo kaj Hispanujo, ĉiam batante lin kaj neniam donante al li sufiĉon por mangi.

Kiam li alvenis Barcelonan, li tiel mizerigis, ke li vekis kompaton, kaj ne povante plu elporti la batojn kaj la malsaton, li forkuris de sia fiĉefo kaj iris al la Itala Konsulo, petante de li protekton. La Konsulo, sentante kompaton, surigis lin sur tiun ŝipon kaj donis al li leteron por la kvestoro en Genova, kiu sendos lin al la gepatroj, kiuj lin vendis kiel beston. La malriĉuleto estis mizera kaj malsanema. Oni donis al li kajuton de la dua klaso. Ĉiuj lin rigardadis; iu lin demandadis; sed li ne respondis, kaj ŝajnis ke li malamas kaj malŝatas ĉiujn ajn, tiom lin maldolĉigis kaj malfeliĉigis la batoj kaj la mizerego. Tri veturantoj tamen per insistaj demandoj sukcesis igi lin paroli, kaj en kelke da krudaj vortoj, intermiksita veneciaj, hispanaj kaj francaj, li rakontis al ili sian historion. Tiuj tri veturantoj ne estis italoj; sed ili komprenis, kaj, iom pro kompatato, iom ĉar ekscititaj per vino, ili donadis al li monerojn, lin enketante kaj incitante, por ke li rakontu aliajn aferojn. Kaj ĉar eniris tiun momenton en la salono kelke da sinjorinoj, la tri vojaĝantoj, por memparado, donacis al li pliajn monerojn, kriante, "Jen prenu! Jen prenu!" kaj jetante la monerojn sur la tablon.

La knabo ĉion enposigis, dankante mallaŭte per ankoraŭ severa mieno, sed jam plisereniganta. Per tiu ĉi mono li povos mangi ion bonan sur la ŝipo—post du jaroj, kiam mankis al li eĉ pano; li povos aĉeti en Genova jakon—post du jaroj, kiam vestis lin nur ĉifonoj; kaj alportante iom de l' mono hejmen, li povos ankaŭ esti akceptata de la gepatroj almenaŭ home, kiuj eble tute ne akceptus lin, se li revenus kun malplenaj poŝoj. Malgranda riĉaĵo por li estis tiuj moneroj. Kaj pri tio ĉi li pensadis, rekonso-

VENDOTA:—160 akreoj da fruktoĉona tero en la meza parto de Brita Kolumbo. Oni sin turnu al L. R. L. Brown, Cummings, Alta., Kanado.

lita, malantaŭ la kurteno de sia kajuto, dum la tri pasaĝeroj interparoladis, sidante ĉe la manĝotablo meze de la salono duaklasa. Ili trinkadis kaj babiladis pri siaj veturoj kaj pri la landoj, kiujn ili vidis. Kaj fine ili ekparoladis pri Italujo. Unu komencis plendi pri la gastejoj, alia pri la fervojo, kaj post ĉio ili hore konsentis, ke ĉio itala estas nur malbona. Unu preferis vojiri en Laponujon; dua diradis, ke li trovis en Italujo nur trompistojn kaj rabistojn; la tria, ke la italaj oficistoj ne scias legi.

"Malklera popolo," rediris la unua.

"Malpura," aldonis dua.

"St..." ekkriis la tria, volante diri "ŝtelista," sed ne povis fini la vorton—urugano da moneroj falis sur iliajn kapojn kaj ŝultrojn kaj rezultis de la tablo, de la planko, kun infera tintgado. Ĉiuj tri levigis furioze, rigardante supren, kaj ricevis ankoraŭ plenmanon da moneroj sur la vizaĝojn.

"Reprenu viajn monerojn," rimarkis malestime la knabo, prezentante sin ekster la kurteno de la kajuto. "Mi ne akceptas almozojn de tiuj, kiuj insultas mian landon."

El itala lingvo tradukis

Ferdinando Morina.

GRAVAJ STATDOKUMENTOJ

La Konstitucio de Usono

Ni, la Popolo de Usono, por formi pli perfektan union, starigi justecon, certigi enlandan trankvilecon, antaŭarangi la komunan defendon, akceli la ĝeneralan bonstaton kaj ĉirkaŭirmi la benojn de la libereco por ni kaj niaj posteuloj, jen dekretas kaj starigas tiun Konstitucion por Usono.

Artikolo I.

Sekcio 1. Ĉiuj leĝfaraj povoj nun donataj estu komisiataj al Kongreso de Usono, kiu konsistu el Senato kaj Cambro de Reprezentantoj.

Sekcio 2. La Cambro de Reprezentantoj konsistu el membroj elektotaj ĉiun alternan jaron de la popolo de la diversaj ŝtatoj, kaj la elektantoj en ĉiu ŝtato havu la kvalifikojn postulatajn por elektantoj de la plej membrohava branĉo de la ŝtata parlamento.

Neniu estu reprezentanto, ne atinginte la aĝon de dudek kvin jaroj kaj

estinte sep jarojn civitano de Usono kaj kiu, en la tempo de elekto, ne estos loĝanto de la ŝtato, en kiu li estos elektata.

La reprezentantoj kaj rektaj impostoj estu proporciataj inter la diversaj ŝtatoj enkalkulotaj en nia Unio laŭ iliaj respektivaj nombroj, kiuj determiniĝu aldonante al la tuta liberularo (inkluzive de l' devantaj servi dum serio da jaroj kaj ekskluzive de indianoj senimpostaj) tri-kvinonojn de ĉiuj aliaj. La efektiva denombro fariĝu interne de tri jaroj post la unua kunveno de la Usona Kongreso, kaj interne de ĉiu sekvonta jardeko, en tia maniero, kian oni perleĝe direktos. La nombro de l'reprezentantoj ne superu unu por ĉiu tridek mil, sed ĉiu ŝtato havu almenaŭ unu reprezentanton; kaj ĝis tia denombro fariĝos, la ŝtato New Hampshire rajtu elekti tri, Massachusetts ok, Rhode Island and Providence Plantations unu, Connecticut kvin, New York ses, New Jersey kvar, Pennsylvania ok, Delaware unu, Maryland ses, Virginia dek, North Carolina kvin, South Carolina kvin kaj Georgia tri.

Kiam vakantajo okazos en la reprezentantaro el iu ŝtato, ties plenuma estraro eldonu elektomandojn por plenigi tiajn vakantajojn.

La Cambro de Reprezentantoj elektu sian prezidanton kaj ceterajn oficistojn, kaj havu sola la denuncpovon.

Sekcio 3. La Senato de Usono konsistu el du senatanoj el ĉiu ŝtato, elektotaj de ties parlamento, por ses jaroj; kaj ĉiu senatano havu unu voĉon.

Tuj post ilia kolektigo sekve de la unua elektado, ili dividiĝu kiel eble plej egale en tri klasojn. La oficoj de la senatanoj unuaklasaj vakiĝu en fino de la dua jaro, duaklasaj en fino de la kvara jaro, kaj triaklasaj en fino de la sesa jaro; tiamaniere ke triono estu elektebla ĉiun alternan jaron; kaj se vakantajo okazos per abdiko aŭ alie, dum libertempo de ŝtata parlamento, ties plenuma estraro povas fari provizorajn elektojn ĝis la venonta kunveno de la parlamento, kiu tiam plenigu tiajn vakantajojn.

Neniu estu senatano, ne atinginte la aĝon de tridek jaroj kaj estinte naŭ jarojn civitano de Usono kaj kiu, en la tempo de elekto, ne estos loĝanto de tiu ŝtato, por kiu li estos elektata.

La vicprezidanto de Usono estu prezidanto de la Senato, sed ne rajtu voĉdoni, esceptinte ĉe egaldisiĝo de l' voĉdonoj.

La Senato elektu siajn ceterajn ofi-cistojn, kaj ankaŭ prezidanton provi-zoran, en forestado de l' vicprezidanto aŭ kiam li plenumos la oficon de l' prezidanto de Usono.

La Senato havu la solan povon juĝi ĉiujn denunciojn: kunsidante tiucele, ili estu jur- aŭ honorovortligitaj. Kiam la prezidanto de Usono estos juĝata, prezidu la ĉefjuĝisto: kaj neniu estu kondamnata sen interkonsento de du-trionoj de la ĉeestantaj membroj.

Puno en okazoj de denuncio ne ampleksu preter elfocigo kaj senkvalifikigo havi kaj ĝui ĉiun oficon de honoro, konfido aŭ profito sub Usono: kaj la kondamnitito estu tamen trafebla de proceso kaj puno laŭ la leĝoj.

Sekcio 4. La tempoj, lokoj kaj maniero elektadi la senatanojn kaj reprezentantojn estu difinitaj en ĉiu ŝtato per ties parlamento; sed la Kongreso povas iam ajn, perleĝe, fari aŭ ŝanĝi tiajn regulojn, esceptinte la lokojn de elektado de l' senatanoj.

La Kongreso kolektigu almenaŭ unu fojon ĉiujare, kaj tia kunveno estu en la unua lundo en Decembro, krom se oni perleĝe difinas tagon alian.

Sekcio 5. Ĉiu ĉambro estu la ju-kvalifikoj de siaj propraj membroj, kaj plimulto en ĉiu konsistigu kvorumon por aferadi; sed nombro malpli granda povas desiri de tago al tago, kaj povas rajte devigi ĉeestadon de membroj forestantaj, en tia maniero kaj sub tiaj punoj, kiel ĉiu ĉambro decidos.

Ĉiu ĉambro povas determini sian proceduron, puni siajn membrojn por malordita konduto kaj povas, laŭ interkonsento de du-trionoj, eksigi membron.

Ĉiu ĉambro tenu taglibron pri siaj procedoj kaj de tempo al tempo publikigu ĝin, esceptinte partojn, kiuj laŭ ĝia juĝo povas postuli sekretecon, kaj la jesoj kaj neoj de la membroj de unu aŭ la dua ĉambro pri kiu ajn demando estu, laŭ deziro de kvinono de la ĉe-estantoj, enskribataj en la taglibron.

Neniu ĉambro, dum kunsido de la Kongreso, disiru sen konsento de la dua por pli ol tri tagojn, nek al alia

loko, ol tiu, en kiu la ambaŭ ĉambroj estos kunsidantaj.

Sekcio 6. La senatanoj kaj repre- zentantoj ricevu salajron por siaj servoj, fiksotan perleĝe kaj pagotan el la Usona kaso. Ili en ĉiuj okazoj ekster perfido, krimo kaj rompo de l' paco havu privilegion ne arestiĝi dum sia ĉeestado ĉe la kunsido de siaj respectivaj ĉambroj kaj alirante tien kaj revenante de tie; kaj pro parolado aŭ debato en unu aŭ la dua ĉambro ili ne interpelaciigu aliloke.

Neniu senatano aŭ reprezentanto estu, dum la tempo, por kiu li elektigis, difinita al iu civila ofico sub la aŭto- ritaro de Usono, se tia ofico kreigis aŭ ĝiaj rekompencoj pliiĝos dum tiu tempo; kaj neniu havanta tian oficon sub Usono estu membro de unu aŭ la dua ĉambro dum sia funkciado en la ofico.

Sekcio 7. Ĉiuj leĝproponoj por naski enspezojn iniciatigu en la Cam- bro de Reprezentantoj, sed la Senato povas proponi aŭ konsenti amendojn kiel ĉe aliaj leĝproponoj.

Ĉiu leĝpropono, kiu aprobigos en la Ĉambro de Reprezentantoj kaj la Senato, estu, antaŭ ol fariĝi leĝo, prezenta al la prezidanto de Usono; se li aprobas, li ĝin subskribu, sed se ne, li resendu ĝin kun siaj kontraŭparoloj, al tiu ĉambro, kie ĝi iniciatigis, kiu enskribu detale la kontraŭparolojn, en sian taglibron, kaj ekreksideru ĝin. Se post tia rekonsiderado du-trionoj de tiu ĉambro konsentos aprobi la leĝproponon, ĝi estu sendata, kune kun la kontraŭparoloj, al la dua ĉambro, de kiu ĝi ankaŭ estu rekonsiderata, kaj se aprobas ĝin du-trionoj de tiu ĉambro, ĝi fariĝos leĝo. Sed en ĉiuj tiaj okazoj la voĉdonoj de ambaŭ ĉambroj estu determinataj per jesoj kaj neoj kaj la nomoj de la personoj voĉdonantaj por kaj kontraŭ la leĝpropono estu enskribataj en la taglibron de ĉiu ĉambro respektive. Se iu leĝpropono ne estos resendata de la prezidanto interne de dek tagoj (esceptinte dimanĉon) post ĝia prezentigo al li, tiu leĝpropono estu leĝo, same kiel se li subskribis ĝin, krom se la Kongreso per sia desiro malebligos ĝian resendon, kiukaze ĝi ne estu leĝo.

Ĉiu ordono, deziresprimo aŭ voĉdono, por kiu necesos interkonsento de la Senato kaj Ĉambro de Reprezentantoj (esceptinte pri demando pri

disiro) estu prezentata al la prezidanto de Usono; kaj antaŭ ol tiu sama ekfunkcios, estu aprokata de li, aŭ, malaprobite de li, estu reaprokata de du-trionoj de la Senato kaj Cambro de Repraŭntantoj, laŭ la reguloj kaj limigoj diktitaj okaze de legpropono.

Sekcio 8. La Kongreso havu povon difini kaj kolekti impostojn, depagojn, importimpostojn kaj akcizojn, pagi la ŝuldojn kaj antaŭarangi la komunan defendon kaj ĝeneralan bonstaton de Usono; sed ĉiuj depagoj, importimpostoj kaj akcizoj estu unuformaj tra Usono;

deprunti monon laŭ la kredito de Usono;

reguligi komercon kun la fremdaj nacioj kaj inter la diversaj ŝtatoj kaj kun la indianaj gentoj;

starigi unuforman regulon de civitanigo kaj unuformajn leĝon pri bankoto tra Usono;

fabriki monon, reguligi ĝian valoron kaj tiun de fremda mono, kaj fiksi la normon de la peziloj kaj mezuriloj; antaŭarangi la punon por falsi la bankbiletojn kaj kurantan monon de Usono;

starigi poŝtoŝtelojn kaj poŝtoŝtelojn; akceli la progresojn de la scienco kaj de la utilaj artoj, havigante por difinitaj daŭroj al la aŭtoroj kaj elpensintoj la ekskluzivan rajton sur iliajn respektivajn verkojn kaj eltrovojn;

starigi tribunalojn malsuperajn al la plej alta kortumo;

difini kaj puni piratajn kaj aliajn krimojn plenumitajn sur la libera maro kaj ofendojn kontraŭ la internacia juro;

proklami militon, doni kaperleterojn kaj fari regulojn koncerne kaptajn sur tero kaj akvo;

varbi kaj vivteni armeojn, sed neniam da mono oni asigu tiucele por pli longe ol du jarojn;

liveri kaj konservi militŝiparon; fari regulojn por regado de la teraj mararmeoj;

antaŭarangi por elvoki la milicion por plenumigi la leĝojn de la Unio, rompi ribelojn kaj repeli invadojn;

arangi organizadon, armadon kaj disciplinadon de la milicio, kaj por regi tian ĝian parton, kiu eble estos uzata en la servado de Usono, rezervante al la ŝtatoj respektive la difi-

nadon de la oficiroj kaj la aŭtoritaton eduki la milicion laŭ la disciplino diktota de la Kongreso;

plenumi absolutan legregadon ĉielajn super distrikto (ne pli ol dek mejlojn kvadrata), kiu, per cedo de apartaj ŝtatoj kaj akcepto de la Kongreso, fariĝos la administrejo de Usono, kaj plenumi saman aŭtoritaton super ĉiuj lokoj acetotaj laŭ konsento de la parlamento de la ŝtato, kie tiu estos, por konstrui fortikojn, municiejojn, armeilejojn, dokarojn kaj aliajn bezonajn domojn;—kaj

fari ĉiajn leĝojn, kiuj necesos kaj konvenos por plenumi la supre ditajn povojn kaj ĉiajn aliajn povojn, komisiatajn per tiu ĉi Konstitucio al la registaro de Usono aŭ al kiu ajn ĝia fako aŭ oficisto.

Sekcio 9. Migradon aŭ enportadon de tiaj personoj, kiajn iu el la ŝtatoj nun ekzistantaj bontrovos, ne malpermesos la Kongreso antaŭ la jaro 1808, sed imposton aŭ depagon oni povas meti ĉe tia enportado, ne superontan dek dolarojn por ĉiu persono.

La privilegio de "habeas corpus"—mandato ne estu interrompata, krom en okazoj de ribelo aŭ invado, se la publika sendangereco postulos.

Neniam leĝon oni faru "ex post facto" aŭ nuligantan la procesojn.

Neniam personan aŭ alian rektan imposton oni faru, esceptinte en proporcio al la denombro ĉi-supre ordonita.

Neniam oni impostu kontraŭ objektoj eksportataj el iu ŝtato.

Oni ne donu preferon per reguligoj de komerco aŭ enpezado al la havenoj de unu ŝtato, ol la havenoj de alia ŝtato; kaj la ŝipoj interveturantaj la ŝtatojn, ne devu enskribi sin, legitimiĝi nek depagi en iu ajn ŝtato.

Oni ne tratu monon el la kaso, esceptinte sekve de asignoj laŭleĝaj; kaj regula etato kaj kalkulo pri la en- kaj elspesoj de l' tuta publika mono estu publikigata de tempo al tempo.

Nenia titolo de nobeleco estu donata de Usono; kaj neniu havanta oficon de profito aŭ konfido sub ĝi (sen konsento de la Kongreso) akceptu ian donacon, honorarion, oficon aŭ titolon ajn, de reĝo, regnestro aŭ fremda ŝtato.

Sekcio 10. *Neniu ŝtato faru traktaton, aliancon nek kunfederigon; donu kaperleterojn; fabriku monon; eldonu kambiojn; faru ion krom oro kaj arĝento pagbazon por suldoj; faru "ex post facto" aŭ proces-nuligan leĝon, nek leĝon ĝenantan plenumon de interligoj, nek donu titolojn de nobleco.

Neniu ŝtato, sen konsento de l' Kongreso, daktu impostojn aŭ depagojn pri importoj aŭ eksportoj, esceptinte la absolute necesajn por plenumigi siajn inspektoleĝojn; kaj la netaj enspezoj el ĉiuj depagoj kaj importoj, diktataj de iu ŝtato pri importoj aŭ eksportoj, estu al dispono de la kaso de Usono; kaj ĉiuj tiaj leĝoj estu sub reviziado kaj regado de la Kongreso.

Neniu ŝtato, sen konsento de l' Kongreso, daktu ŝipimpostojn, havu

regulan armeon aŭ militŝiparon en paca tempo, interkonsentu nek traktu kun alia ŝtato, aŭ kun fremda regno, nek ekmilitu, krom se efektive invadita, aŭ en tia urĝa danĝero, kiu ne allasos prokraston.

(Daŭrigota.)

(Noto: se niaj eksterlandaj legantoj ne komprenas partojn de la Usona Konstitucio, kiel nun tradukata, oni ne hezitu metu demandojn al la Redaktoro de **Amerika Esperantisto**, kaj (eĉ kun jurista helpo) oni penos klarigi tiujn partojn. Oni tute ne pretendas, ke la nuna traduko estas definitiva; ĉar la lingvaĵo de nia bazdokumento estas malfacila kaj postulas zorgan studadon por ĉie kompreni eĉ en la originalo.)

HAVE YOU HEARD

OF THE

Llano Co-operative Colony?

This is the largest co-operative colony in the world and the most complete form of co-operative. *The Llano del Rio Colony*, at Llano, Los Angeles County, California, has just purchased a 16,000 acre tract in Louisiana. It bought an entire town with the land. Within six months 1000 persons will be living there.

The WESTERN COMRADE

Tells each month of what these co-operators are doing. Send for a free sample copy and learn what is being done where all men are paid an equal wage, where private profits have been abolished, and where there is neither rent nor interest paid by individuals.

Llano Western Comrade Stables, Louisiana

(Formerly of Llano, California.)

DEZIRAS KORESPONDI

One insertion: 10 cents; four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address.

Unufoja anonco: 20 sd.; kvarfoje: 50 sd. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso.

S-ro Agustin S. Vidal, Mondoza 3437, Rosario, Santa Fe, Argentina. 1

S-ro C. Morice, Sontay, Tonkin, Indo-China. I. P., P. M. 1

S-ro Arthur Daem, Hop. mil Belge, lup. Perat, Francujo. 9

Angel J. Mazzuconi, Strato Cochahambra 983, Buenos Aires, Rep. Argentina. (IPK.) 9

Johano E. Barquin, Strato Castelli 123, Bahia Blanca, Rep. Argentina. (IPK.) 9

Statement of the Ownership, Management, Circulation, Etc., required by the Act of Congress of August 24, 1912, of *Amerika Esperantisto*, published monthly at West Newton Station, Boston, Mass., for October 1, 1917.

Publisher, The American Esperantist Co., West Newton, Mass.

Editor, Managing Editor, Business Manager, Ernest F. Dow, West Newton, Mass.

Owners: The Esperanto Association of North America; Major H. W. Yemans, Pres., Alcatraz, Calif.; Dr. B. K. Simonek, Vice Pres., Chicago, Ill.; Ernest F. Dow, Sec., Treas., West Newton, Mass.

Ernest F. Dow, West Newton, Mass.

No bonds or mortgages.

Ernest F. Dow, Bus. Man.
Sworn to and subscribed before me this 15th day of October, 1917.

Frank M. Grant, Notary Public.
My commission expires Dec. 10, 1920.